

Ora Ĵurnalo

Numero 22, Oktobro 2019



Göteborgs Tingsrätt/La distrikta tribunalo de Gotenburgo

Al la tuta mondo:

Bonvenon al la **verda** Gotenburgo !

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo	2	Viktiga länkar efter besöket på bokmässan 26/9	22
Pri Ora Ĵurnalo	2	En la Libro-Foiro estas sufiĉe bona fokuso sur la kondiĉoj kaj rajtoj de virinoj	23
Eseporko meditas.....	3	Google honoras la unuan virinon, kiu atingis la pinton de Mount Everest.....	24
I Göteborgs-Posten den 1 oktober 2019	4	Emmeline Pankhurst de Britio.....	24
La tago de Winnie la Pu	5	Charlotte Corday d'Armont	25
Salutojn de Margareta en Ĥorvojaĝo al Berlino	6	La Ārsta Mastrino aŭ Mārta Helena Reenstierna	25
Bildoj el Halbe kaj Berlino, faritaj de Margareta	7	June Richmond	26
Memoreto pri Louis Christophe Zaleski Zamenhof.....	8	Sara Danius	26
Vortenigmo	9	Je ĉielo, knabinoj! La liberiĝo proksimiĝas! ..	27
Tago en Bialystoko de Lottie Eriksson	10	Arbarstrigo.....	27
Leono estas besto	12	Historiaj mezuriloj kun pligrandigitaj skaloj de Lasse Granat	28
Esperantosabato 2019-10-05	13	Nilomezurilo.....	28
Juraj aferoj	13	La ekzaktaj mezuriloj de Tycho Brahe.....	28
Esti laika asesoro	14	Mia hejmfarita varianto de preciza ilo je iomete fortika formato	29
Distrikta tribunalo (Tingsrätt)	15	Ĉe la asocio de "Finnaj militinfanoj"	30
La alia spuro estas la Administra Juro.....	15	Temo por debato: Ĉu la disponeblaj rimedoj de la mondo pliboniĝus se ni estus malpli multaj?	30
Migrado.....	16	Inga trovis interrete proverbojn, kunmetitajn de L.L. Zamenhof.....	31
Dum la Libro-Foiro oni havas eblecon diskonigi Esperanton.....	16	Panoramo de la arkipelago ekster Bohuslando	32
Monica Zak, verkistino de "La knabo, kiu vivis kun strutoj", vizitis nian standon	17	Einar Dahls esperantominnen	33
Svensktalande ungerska besökte vår esperantomonter	17	Esperanto och jag	34
Valdemar Langlet – En bortglömd hjälte.....	18	Esperanto i folkskolan	35
Siv kaj Helén en la stando, parolante pri la klimato	19	Aŭtuno en Gotenburgo.....	36
Pierre Schori estis intervjuita de Amanda Lindell dum la Libro-Foiro.....	20		
Erik Åberg deziras al Esperanto sukceson ...	20		
Liksom havet förenar länder och människor	21		

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Ora Klubo,
subtena klubo de la esperantolibrejo en
Stannum, Östadvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79,
siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat,

073-502 53 32, ingeagerd.granat@telia.com.
Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström,
arendsian@hotmail.com.

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas
viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!

Espeporko meditas



☆ Estas tempo noti ke Ora Ĵurnalo baldaŭ celebros sian duan naskiĝtagon. Nia retgazeto

unue aperis en novembro 2017.

- ☆ Se vi havos tempon kaj eblecon vi ĉiuj estos bonvenaj al la celebros la 9an de novembro je 10:30 h en Redbergsskolan Gotenburgo. Bv anonci vin por ke ni sciu, kiom da tortoj estos bezonataj! Vi ankaŭ aŭskultos prelegojn pri vojaĝoj al Hungario kaj Germanio.
- ☆ En ĉi tiu numero vi povas legi pri la nepo de L.L. Zamenhof, L. Ch. Zaleski Zamenhof. Li forpasis la 9an de oktobro 2019.
- ☆ Pri Bialystok rakontas Lottie Ericson, sveddevena kanadanino. Post la UK ŝi kune kun sia edzo vizitis Bjalistokon kaj sendis artikolon al Ora Ĵurnalo.
- ☆ Per helpo de la germana esperantisto Ralf Fröhlich, Margareta Andersson aranĝis ĥorvojaĝon al Berlino.
- ☆ Ĉar Puff kaj Jin estis malhelpitaj veni al la oktobra Esperanto-Sabato, Ingegerd prenis sur sin la taskon prelegi. Nun ni scias pri la rolo de laika asesoro. Interese! Printempe ni espereble havos viziton de Puff kaj Jin, kiuj la pasintan someron iris al Ĉinio!!!
- ☆ Ankoraŭ ni ne tute forlasis la memorojn de la UK en Lahtio. La membroj de la asocio


”Finska Krigsbarn” vidis bildojn de la UK en Lahtio, kaj havis informon pri la strukturo de Esperanto.



- ☆ Virinoj abundas en la oktobra numero. Fortaj virinoj!
- ☆ Lasse Granat respondecas pri teknika informo. Jen iloj de Egiptio, de la insulo Ven kaj de Gunnilse.
- ☆ Svedparolanta hungarino vizitis nian standon en la Libro-Foiro kaj parolis pri la svedo Valdemar Langlet.
- ☆ La 14a de oktobro estis la tago de Winnie la Puh. La rolulo estas malpermesita en Popola Ĉinio, pro sia laŭdira simileco kun la ĉina prezidento Xi Jinping.
- ☆ Ĉu vi ŝatas debati? Tiukaze, traktu la temon, lancita de Anna Eriksson, Gotenburgo, ”Ĉu la disponeblaj rimedoj de la mondo pliboniĝus, se ni estus pli malmultaj?” Pri tio Greta Thunberg ne parolis.
- ☆ En Göteborgs-Posten la vorto ESPERANTO estas menciita la 1an de oktobro kaj la 15an de oktobro. Sendependa ĵurnalistino sub la signaturo FLOKA verkis leĝerstilan artikolon pri 1) Plupo kaj esperanto kaj 2) pri esperantisto en dezerto. Mi invitis ŝin al la Esperanto-Sabato, la 9an de novembro, sed tiam ŝi estos en centra Azio. Ŝi demandis min ĉu tie ekzistas esperanto-klubojn. Mi serĉis kaj trovis kelkajn delegitojn en Jarlibro. Se iu konas esperantistojn ekz. en Kirgizistano – bv sciigi min! /Siv

I Göteborgs-Posten den 1 oktober 2019

Med tillstånd av frilansande journalisten Karin Flodhammar, signaturen FLOKA, återger vi nu hennes kåseri.



Dum la hela somera nokto la ursoj kuŝas dormante kun Plupo ĉe la sino. Plupo kredeble neniam antaŭe kuŝis tiel mole kaj varme – sternita en ursofeloj.

FLOKA 259 tisdag 1 oktober 2019:

Esperantisterna. Alltid på hugget! I detta fall med boken "Plupp och björnungarna" på esperanto, 30 kr på Bokmässan. Knep den direkt. Vita vackra landskap, vinter i fjällen, snö som smeker fjälltopparna i mjuka vågor och lille Plupp med sitt yviga blå hår. Han träffar på två björnungar som kommit vilse på fjället när han är ute och plockar blåbär, och det hela slutar med att han somnar i famnen på björnungarna när han hjälpt dem att hitta hem. Han talar ju deras språk, kan prata med alla djur. Plupp ligger i mitten, inbäddad i björnarnas mjuka, bruna päls, bara det blå håret sticker upp. I bakgrunden

blånar den ljusa sommarnatten över fjället. Det är sommar men kallt, som det är i fjällen. Dum la hela somera nokto la ursoj kusaŝ dormante kun Plupo ĉe la sino. Plupo kredeble neniam antaŭe kusaŝ tiel mole kaj varme - sternita en ursofeloj.

Minns ni den? Sagan av Inga Borg från 1983? Konstnären och författaren som skrev böckerna om Plupp - sagofiguren med det blå håret som kan tala med djuren. Jag tror det var hon som fick mig att tjata om att jag skulle få en lämmel istället för ett marsvin när jag var liten, eftersom jag såg hur många det fanns i fjällen jämfört med i Zooaffären hemma.

Åter till esperanton. Ett världsspråk, där alla kan förstå varandra på jämlika villkor. Det skapades i Warszawa 1887 av L.L.Zamenhof. Han tillhörde det judiska folket, som inte betraktades som patrioter även om de bott i landet i hundratals år. "Att internationellt använda ett nationellt språk ger de länder, där dessa språk talas, ett kulturellt och ekonomiskt övertag" menade han. Ingen äger esperanto. Eftersom vi alla är medborgare av samma planet och borde behandla varandra jämlikt behövs också ett jämlikt språk när två personer inte förstår varandras modersmål. Inga knaggliga försök att argumentera på ett språk den andre behärskar till fullo. Sant, eller hur?

Jag tänker mig det nyss avslutade klimatmötet i New York. Visserligen medverkade inte president Trump själv, men hans kommentarer, hållna på esperanto, hade nog uppfattats som mjukare än hans något kantiga amerikanska. Hur skulle "She seems like a very happy young girl looking forward to a bright and wonderful future" låta som svar på 16-åriga Greta Thunbergs invigningstal vid FN:s klimatmöte? Kanske lite ödmjukare. Finns ordet cynisk för övrigt på esperanto? Gretas tal inleddes med orden: "People are suffering, people are dying, entire ecosystems of mass extinction and all you can talk about is money and fairytales of eternal economic growth".

Det finns något vackert i tanken om ett språk som ingen äger, en blandning av enkla ord

från alla språk som de flesta förstår. Ett lätt uttal och förenklad grammatik. Men hur går det med arabiskan tänker jag då? Och mandarin? Alla tecken som ska översättas? Jag förstår inte allt när jag läser Inga Borgs Plupp på esperanto, men kanske är det bilderna som talar. Björnfamnen. Kärleken. Tryggheten. Att vi alla är ett, djuren, växterna, planeten. Den borde Trump läsa. Prezidanto Trump devus legi la libron Plupp!

Min kommentar: Det är så positivt att träffa en journalist, som är öppen för andra alternativ än engelska. Karin Flodhammar besökte vår monter på Bokmässan. Pluppböcker hade vi förstås.


Fem av den fina serien är översatt till esperanto:

Plupo en la grandarbaroj,
Plupo kaj la lupoj,
Plupo kaj la gruoj
Plupo kaj la ursidoj,
Plupo kaj la maroj.

Tänk att Plupp skulle locka till en artikel om esperanto!

14 dagar senare kunde vi under rubriken Världens gång i Göteborgs-Posten läsa ännu en artikel med esperantoanslag: "Byta t-shirts i öknen" av signaturen FLOKA. Esperantister har hört av sig efter det första kåseriet. Viktigt att vi aktivt tar del av allt som skrivs om esperanto! /Siv

La tago de Winnie la Pu



Inga Johansson ricevas leterojn de Italio, kie oni ĉiam havas atenton pri la "enhavo de la tago".

La 14an de oktobro estas la tago de Winnie la Puh.

Salutojn de Margareta en ĥorvojaĝo al Berlino



Margareta Andersson plej dekstre. Ralf Fröhlich (Sascha) peris la kontaktojn inter la ĥoroj (li ne estas en la bildo).

De la 3a ĝis la 6a de oktobro la ĥoro de Glöstorpe, Gotenburgo, faris vojaĝon al Berlino. Vendrede ni havis kvarhoran gvidatan rondiron kaj spertis iomete de la ŝanĝo de la urbo dum la 30 jaroj, kiuj pasis post la falo de la murego. Restis memoroj de la dua mondmilito – ekz. la preĝejo Kaiser Wilhelm Gedächtniskirche.

Sabate ni iris per S-linio, U-linio kaj trajno 60 km sudorienten de Berlino en la malnovan Orientan Germanion – al Halbe, nuntempe loko kun pli ol 2000 loĝantoj. Halbe – la loko kie la dua mondmilito finiĝis! De la 21a de aprilo ĝis la 1a de majo 1945, minimume 60 000 homoj pereis kaj 120 000 germanoj estis kaptitaj. Ralf rakontis ke kiam la Ruĝa armeo alproksimiĝis, la germanaj soldatoj fuĝis en direkton al la aliancanoj por eviti finon en rusaj militkaptitejoj.

Dank al esperanto kaj kontakto kun Ralf Fröhlich ni povis havi koncerton en Dankeskirche en Halbe. Ĝoje surprizitaj ni ekvidis, ke nia afiŝo estis metita ĉie, ekster la apoteko, en la nutraĵvendejo, sur komunaj afiŝtabuloj... !

Ralf rezervis tablojn por ni en la kvartala drinkejo "Goldener Stern", kie ni lunĉis kune kun li, la filino Sanja, la esperantoamiko Ariel kaj du angle parolantaj gastoj de Bruselo.

Poste ni vizitis la stacidomon (kiun Ralf aĉetis la pasintan jaron por i.a. havi kunvenojn). La stacidoma konstruado estis farita por la vizito de la imperiestro en la 19a jarcento.

Dum jardekoj ĝi kadukiĝis, sed ekde la somero novzelandano, Peter Macky, prenis sur sin la taskon renovigi ĝin al origina stato – tre bele!



La koncerto estis granda travivaĵo por la ĥoro, ĉar venis multaj – almenaŭ 60 entuziasmaj aŭskultantoj. Eĉ la urbestro!

Kiel finparto ni kantis esperanto-kanton kune kun la publiko.

La ĥoro de Glöstorps estas tre dankaj kaj ĝoĝaj pro la tuta vojaĝo.


😊 /Margareta Andersson

Bildoj el Halbe kaj Berlino, faritaj de Margareta




Frata kiso sur la muro (Breĵnev kaj Honecker).

Ralf kun filino.



Kaiser Wilhelm Gedächtniskirche.

La stacidomo de Halbe.



La afiŝo en Halbe.

Memoreto pri Louis Christophe Zaleski Zamenhof...

La nepo de L.L.Zamenhof



Filmo dum la 100-a Universala Kongreso de Esperanto en Lillo 2015:
<https://www.youtube.com/watch?v=Jm9ENZiCi08>, SvisRaporto.

LOUIS-CHRISTOPHE ZALESKI-ZAMENHOF forpasis la 9an de oktobro 2019. Louis-Christophe (Ludoviko Kristoforo) Zaleski-Zamenhof (naskiĝis la 23-an de januaro 1925 en Varsovio, mortis la 9-an de oktobro 2019 en Parizo) estis doktoro inĝeniero pri surlanda kaj enmara konstruado, aparte pri premŝtalbetono, nepo de L. L. Zamenhof. Li estis filo de Adam Zamenhof kaj Wanda Zamenhof, naskita Frenkiel; la personan nomon li ricevis honore al sia avo, Ludoviko Zamenhof, la kreinto de Esperanto. Li estis Honora Membro de UEA.

Li studis en Varsovia Politekniko 1946–49 kaj diplomiĝis kiel inĝeniero pri konstruado, poste doktoriĝis pri teknologio de streĉbetono. En 1959 li translokiĝis al Parizo kaj daŭrigis sian profesion karieron en Francio kaj aliaj landoj, realigante konstruaĵojn sur tero kaj maroj.

Lia alia kampo de laboro estis didaktiko en la Arkitektura Altlernejo en Parizo kaj Politekniko en Milano. Li publikigis multajn artikolojn kaj librojn pri sia fako. Post la emeritiĝo en 1993 li okupiĝis pri faka konsultado, ĉeestis sciencajn konferencojn

kaj kongresojn, inkluzive de Esperanto-kongresoj.

Ludoviko Kristoforo Zaleski-Zamenhof edziĝis en 1949 kun Krystyna Tyszka, kiu naskis du filinojn: Hanna (1953) kaj Margaret (1958). Tiu havis nepinon Klementina Zamenhof-Zaruski kaj nepon Pierre-Louis-Antoine Lebard. Li loĝis en Parizo kun la edzino Juliette, naskita Sekrecka. Li parolis la francan, anglan kaj Esperanton, sed hejme la polan. Li havis la francan kaj polan civitanecojn, kaj estis honora urbano de Bjalistoko.

En 1934 Ludoviko esprimis la deziron partopreni en la Universala Kongreso de Esperanto en Stokholmo. Liaj gepatroj asertis, ke partopreni en Esperanta kongreso, sen koni tiun ĉi lingvon mistrafigas la celon. La filo helpata de siaj onkloj Zofia Zamenhof kaj Lidia Zamenhof entuziasme eklernis kaj ekposedis flue la lingvon internacian.

Tiel komenciĝis lia nova rolo de la "eta princo" dum laŭvicaj Esperantaj kongresoj. Li iĝis objekto de interesiĝo por la

kongresanaro: en Stokholmo – 1934, en Romo – 1935, en Vieno – 1936 kaj en Varsovio – 1937, kie li nome de la familio Zamenhof, salutis la kongresanojn.

Septembre 1939 la germanaj aviadiloj bombardis Varsovion. La domo ĉe la Królewska-strato 41, en kiu loĝis la familio Zamenhof, estis komplete detruita. Tiam Ludoviko estis nur 14-jara knabo.

En la lasta fazo de sia longa inĝeniera kariero d-ro Zaleski-Zamenhof montriĝis pioniro de streĉbretona konstruado de platformoj, por ĉerpi petrolon de sub la marfundo. Multajn jarojn li lekcis pri la teorio de konstruado en la Arkitektura Altlernejo en Parizo. Li estis ankaŭ kontrakta profesoro en Politekniko de Milano pri markonstruado el streĉita betono, krome lekcis de tempo al tempo pri la sama studobjekto en pluraj landoj, interalie en polaj politeknikoj en Gdansk kaj Bjalistoko.

Louis Christophe Zaleski-Zamenhof emeritiĝis 1993, sed li plu disponigis laŭbezzone sian scion kaj sperton kiel konsultisto. En 1987 Varsovio, kiel "lulilo de Esperanto", estis ĝusta loko por celebri la centjaran jubileon de la lingvo internacia. La 72-a Universala Kongreso de Esperanto en la ĉefurbo de Pollando evidentiĝis la plej granda en la historio de la movado. Ĝi allogis 6 mil partoprenantojn, sen kalkuli proksimume unu milon da gastoj, kiuj alvenis sen la formala aliĝo el Sovet-Unio kaj el aliaj t.n. socialismaj landoj. La direktoro de UEA, Simo Milojević,

sukcesis trovi en diversaj landoj de la mondo sep membrojn de la Zamenhofa familio, kiuj alvenis kiel honoraj gastoj, inter ili Louis Christophe Zaleski-Zamenhof kun la edzino Juliette. Li, kiel la nepo de la kreinto de Esperanto, varsoviano kaj monde renoma konstruisto de "artefaritaj insuloj" sur maroj kaj oceanoj, montriĝis aparta atrakcio por ĵurnalistoj, sed ankaŭ por la kongresanoj.

Louis C. Zaleski-Zamenhof, reaperinte en la movado post dudekjara paŭzo, jam firme restis en ĝi. Li engaĝiĝis en la popularigon de la lingvo internacia kaj ĝia ideo per siaj intervjuoj por amaskomunikiloj. Li ankaŭ renkontiĝadis kun esperantistoj, kion respegulas la filmo aperinta en la Pola Televido s.t. "Śladami Dziadka" (Spuroj de la Avo). En ĝi la nepo estas montrita en kelkaj lokoj, ligitaj kun lia avo Ludoviko Zamenhof. Bjalistoko iĝis ofta vizitcelo de L.C. Zaleski-Zamenhof.

En la jaro 2000 li akceptis simblan diplomon pro la fakto, ke lia avo Ludoviko Zamenhof gajnis la unuan lokon en la plebiscito por "Bjalistokano de la 20-a jarcento". En la jaro 2007 li estis nomita honora urbano de Bjalistoko apud 14 aliaj distingitoj, inkluzive de Józef Piłsudski kaj Lech Wałęsa. Li plurfoje vizitis Bjalistokon kiel membro de la Fondumo Zamenhof respondeca pri la konstruo de Zamenhof-Centro.

Pli da informoj legu en la teksto de Roman Dobrzyński, aperigita en Vikipedio.*

*) https://eo.wikipedia.org/wiki/Louis-Christophe_Zaleski-Zamenhof

Vortenigmo

Ĉu vi povas eltrovi kiuj la vortoj estas? Temas pri fruktoj/beroj, bestoj kaj vestaĵoj. La solvo troviĝas en paĝo 23.

Gifo
Grafo
Ĝarono
Kladito
Cinkavio

Ruso
Pluvo
Ursico
Niacero
Ordadermo

Orbo
Talpo
Zeĉimo
Neltamo
Plotemko

Tago en Bialystoko de Lottie Eriksson



kiun ni renkontis en UK en Lahtio, Finnlando. Lottie naskiĝis en Svedio, sed transloĝiĝis al Kanado antaŭ kelkaj jaroj. Post la UK ŝi multe vojaĝis en Eŭropo. Mi petis ŝin skribi iometo por Ora Ĵurnalo. /Siv



Pasintan someron mia amiko Davido kaj mi vojaĝis en multaj eŭropaj landoj kaj ni vizitis ankaŭ Varsovion dum tri tagoj. Sed kiam ni estis tie – HO VE KATASTROFO!!! Mi tute forgesis viziti la Zamenhofan tombon.

Sed vespere antaŭ forlasi Varsovion mi havis ideon iri al Bjalistoko, loko de la infaneco de Zamenhof.

Ni nur volis pasigi duonan tagon tie kaj mendis BLABLAaŭton je la tria horo. Kio estas BLABLAaŭto? Se vi ne scias, goglu ĝin! (Siv: <https://en.wikipedia.org/wiki/BlaBlaCar> –

estas organizo por konekti personojn, kiuj volas iri kune inter urboj. Per reta apo vi trovas kunvoĝantojn.)

Samideano Przemek, ĉirkaŭ tridekjara, renkontis nin en la aŭtobusstacidomo. Mi estas membro de Pasporta Servo kaj mi trovis lin en la retejo. Li estas prezidanto de la loka Esperanta klubo kaj lia profesio estas interpretisto de la pola lingvo al Esperanto. La plejparto de lia laboro venas de Centro de Esperanto en la urbo. Li lernis Esperanton kiam li havis 15 jarojn.





Ni piediris tra la urbo kaj la unua halto estas la Esperanta klubĉambro, kiu estas en la kelo de la sinagogo. En la ĉambro estas multe da bildoj, libroj, flagoj, trofeoj, instruaj materialoj, ĉio signo de multe de aktivecoj.


Estis eĉ bildoj en la necesejo.

Ekstere estis granda ŝtono kun ĉizita mesaĝo, metita tien en 1987. La skribo estas en la pola kaj en la esperanta lingvo kaj diras:

PARTOPRENANTOJ DE LA 72A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO KAJ LA LOĜANTARO DE BIALOSTOKO DECIDIS KE EN ĈI TIU LOKO ESTU KONSTRUOTA LA MONDA CENTRO DE ESPERANTO.

Bona ideo, ĉu ne? Sed ĉi tio neniam okazis ĉar neniuj personoj delogis fari ĝin. Estas belega ŝtono sed nun ĝi estas tie nur por ke esperantaj klubanoj admiru ĝin, kiam ili alvenas aŭ forlasas kunvenojn kaj lecionojn.

La dua loko estas la bela urbo.



Placo kun muzikistoj, floroj, restoracioj kun tabloj kaj seĝoj ekstere. Ni facile trovis restoracion kun la nomo Esperanto. Mi mendis ordinaran kafon, enuiga, ĉu ne? Miaj kunuloj mendis la tradician trinkaĵon "buza", fermentitan mijolakton kun sekvinberoj. Kiu pagis fakturon? Nia amiko, Doktoro Zamenhof klare!

Post restoracia vizito piedirante Przemek montris al ni multajn Zamenhofstatuojn laŭlonge de la stratoj kaj en parkoj. Ni promenis ankaŭ kun li, Ludvik Zamenhof, frumatene. Ni devis rapidigi lin, por ke li ne alvenu malfrue al sia lernejo. Estas ankaŭ stratoj nomitaj laŭ li kaj bela murpentraĵo, Zamenhof en la meza balkono.





Jes, la urbo estas bela kun granda preĝejo, ornamitaj domoj, eta rivero, piedirantoj kaj biciklistoj, ĝi estas ankaŭ tre konata pro marionetoj.

La Esperanta Centro estas apude kaj ĝi estas plenplena de interesa informo pri la infaneco de Zamenhof.

La tempo rapide forpasis kaj ni serĉis BLABLAaŭton sed ĝi estis nenie trovebla.

Ĉar estus neniu buso al Kaunaso, Litovio, nia venonta loko por viziti, invitis nin dormi en "sia gastejo" – la klubĉambro.

Post bona vespermanĝo kune ni enlitiĝis sur plenlovebla matraco kaj revis pri vivo en Bjalostoko antaŭ jaroj kun Zamenhof protektante nin!

/Lottie Eriksson

Koran dankon, Lottie! /Siv



Leono estas besto



Inga Johansson: Kiam Zamenhof verkis sian unuan lernolibron pri esperanto, li enmetis ĉi tiun frazon: "**Leono estas besto**". La frazo estas dusenca. Lia pli juna frato Leono estis tiom petolema kaj ĝenis lin.

https://eo.wikipedia.org/wiki/Leono_Zamenhof

Leono Zamenhof – Vikipedio

Leono (ruse: Lev, pole: Leon) ZAMENHOF, (ps. Lozo, Zetel, Elzet) (naskiĝis la 19-an de

oktobro / 31-an de oktobro 1875 en Varsovio, mortis la 7-an de februaro 1934 en Varsovio) estis frato de Zamenhof, kuracisto de malsanoj de gorĝo, oreloj kaj nazo. Li estis unue rusa civitano, post la unua mondmilito ŝtatano de la restarigita Pollando.



The Lion Sleeps Tonight.

Jen ĥoro kantas pri leono (Coro Esperanto): <https://www.youtube.com/watch?v=CPYg9pWinTc>

Esperantosabato 2019-10-05

Juraj aferoj

Unue vortlisto, fare de Ingegerd Granat, kiu kiel laika asesoro konatiĝis kun la sveda jura sistemo.

Juridiska ord på esperanto

Tingsrätt	Distrikta tribunalo
Brottmål	Kriminala proceso
Tvistemål	Civila proceso
Ekobrottmål	Ekonomia krimo
Lagman	Prezidanto de apelacia tribunalo
Våldsbrott	Perforta krimo
Administrativ enhet	Administracia unueco
Hovrättsassessor	Apelacia asesoro
Tingsfiskal	Akuzisto de distrikta tribunalo
Tingsnotarie	Protokolisto de distrikta tribunalo
Expeditionsvakt	Ekspedeja gardo
Häkte	Arestejo
Handboja	Fer-manumo
Hovrätt	Apelacia tribunalo
Vittne	Atestanto
Överklaga	Apelacii
Åklagare	Prokuroro
Väktare	Gardisto
Förvaltningsrätt	Administra juro
Kammarrätt	Apelacia administra tribunalo
Avgöra	Decidi
Överklaga	Apelacii
Beslut	Dekreto
Migrationsdomstol	Migrada tribunalo
Pröva	Kontroli kulpecon
Fatta beslut	Fari decidon
Mål	Juĝafero
Socialtjänst	Socia servo
Socialförsäkringsmål	Sociale asekura juĝafero
Psykatri	Psikiatrio
Tvångsvård	Deviga flegado (LVM)
Tvångsvård av missbrukare	Deviga flegado de misuzantoj (LPT)



Tvångsvård av psykiskt sjuka	Deviga flegado de psike malsanaj homoj
Tvångsvård av unga	Deviga flegado de gejunuloj
Lagman	Prezidanto de apelacia tribunalo
Domstol	Tribunalo
Sal	Salonego
Domare	Juĝisto
Ordinarie domare	Ordinara juĝisto
Chefsrådman	Ĉefa juĝisto
Rådman	Urba skabeno
Notarie	Tribunala protokolisto
Assessor	Asesoro
Fiskal	Akuzisto
Föredragande jurister	Raportantaj juristoj
Skattemål	Impostaj juĝaferoj
Administration	Administrado
Muntlig förhandling	Buŝa intertrakto

Nämndeman	Skabeno	Övriga	
Val	Elektio	skyddsbehövande	Restantaj bezonantoj de protekto
Regionfullmäktige	Regiona rajtigito	Synnerligen ömmande omständigheter	Aparte kompatigaj cirkonstancoj
Överläggning	Konciliĝo	Anhörig	Parenco
Asyl	Azilo	Familjeåterförening	Familia reunuiĝo
Migrationsverket	Migrada administro	Bevisbörla	Devo alporti pruvojn
Tillfällig lag	Okaza leĝo	Identitet	Idento
Uppehållstillstånd	Restadpermeso	Landrapport	Landoraporto
Resedokument	Vojaĝdokumento	Flyktingström	Fluego da rifuĝantoj
Flykting	Rifuĝinto, -anto	Etnicitet	Etnismo
Alternativt skyddsbehövande	Bezonantoj de alternativa protekto	Tortyr	Torturo
Kvotflykting	Kvota rifuĝinto	Försörjning	Vivteno
Flyktingläger	Tendaro por rifuĝintoj		

Esti laika asesoro

Tiele komenciĝis por mi – Ingegerd informas.

Jen – en la sveda – la ĵuro kiun mi devis fari antaŭ ol komenci mian taskon esti laika asesoro en Vestrogotio. /Ingegerd Granat:

Från ett domstolsprotokoll från 2006-04-18: I Länsrätten i Göteborg, Rotel 24, fick nämndemannen Ingegerd Granat avlägga domareden enligt 4 kap. 11 paragrafen i rättegångsbalken inför Rådsmannen Birgitta Henriksson och med handen på bibeln sa jag efter:

Jag Elin Ingegerd Maria Granat lovar och försäkrar på heder och på samvete, att jag vill och skall efter mitt bästa förstånd och samvete i alla domar rätt göra, ej mindre den fattige än den rike, och döma efter Sveriges lag och laga stadgar; aldrig lag vränga eller orätt främja för släktskap, svågernskap, vänskap, avund, illvilja eller räddhåga, ej heller för mutor och gåvor eller annan orsak, under vad sken det vara må; ej saker göra, som saklös är, eller den saklös, som saker är. Jag skall varken förr, än domen avsäges, eller sedan uppenbara dem, som till rätta gå, eller andra de rådslag rätten inom stängda dörrar håller. Detta allt vill och skall jag som en ärlig och uppriktig domare troget hålla.

Ingegerd Granat

... och jag skall tillägga att denna ed gett mig styrka och kraft under de år jag verkat.



La prelego de Ingegerd komenciĝis drame. Oni aŭdis la sirenon kaj vidis la bluan lumon de polica aŭto. Christin kaj Lasse aktoris.



Distrikta tribunalo (Tingsrätt)

La **Distrikta tribunalo** en Gotenburgo havas ĉirkaŭ 230 dungitojn.

Ĝi juĝas pri kriminalaj, civilaj, kaj ekonomiaj procesoj.

Prezidanto de la apelacia tribunalo estas la ĉefo, kaj ri ankaŭ partoprenas en la juĝa agado.

Ses ĉefaj urbaj skabenoj kaj tridekoj da aliaj skabenoj deĵoras je la distrikta tribunalo.

Asesoroj de la Apelacia tribunalo kaj akuzistoj de la distrikta tribunalo edukadas por fariĝi juĝistoj kaj dumtempe ili laboras pri propraj aferoj.

Ĉirkaŭ 40 tribunalaĵaj protokolitoj laboras en la Distrikta tribunalo dum ne pli ol du jaroj. Tio estas la unua paŝo en la edukado celante fariĝi juĝisto aŭ advokato.

Ekspedejaj gardantoj respondecas pri la informo al la publiko, al la interna distribuo kaj pri ordo kaj sekureco.

La "publika principo" regas se la afero ne estas sekretdeklarita.

La sekva instanco por apelacii la juĝon de la Juĝa konsido estas la **Apelacia tribunalo**

(Hovrätten), kiu krom en Gotenburgo ankaŭ troviĝas en Stokholmo, Malmö, Jönköping, Sundsvall kaj Umeå. La organizo havas kvar juĝantajn sekciojn kaj unu administran sekcion.

La polico esploras kaj levas akuzon kiam temas pri kriminalaj procesoj en la Distrikta tribunalo kaj Apelacia tribunalo. Polico kaj prokuroro ankaŭ povas formeti la aferon.

La plej alta instanco post la Apelacia tribunalo estas la **Alta Kortumo**.

La alia spuro estas la Administra Juro

Ekz. Persono disputas kun aŭtoritato. Povas esti aferoj kiuj temas pri:

LPT – deviga flegado de psike malsanuloj.
LVU – deviga flegado por gejunuloj.
LVM – deviga flegado de misuzantoj.
LRV – la leĝo pri deviga flegado de jura medicino.

Oni ankaŭ kontrolas ĉu komunumo/gubernio obeas la leĝon pri Publika aĉetado. Plue:

LSS – la leĝo por apogo kaj servado por handikapitoj.
Aferoj de sociala asekuro.
Apogo por vivteno.
Teritoriaj disputoj.

Licencoj pri ĉasado kaj armiloj.
Konfisko de konduklicencoj.

Migrado

Kiam venas apelacioj pri migradaj aferoj al la Administra Juro por denove esti juĝataj, ili antaŭe estas juĝataj de la Migrada administro. Kiam la registaro lancis la "provizoran leĝon" en julio 2016, la nombro de azilpetantoj malkreskis.

En 2015 venis 163 000 personoj kaj en 2017 nur 26 000 venis. La leĝo estis plilongigita de la parlamento ĝis la jaro 2021.

Apelacio de verdikto de la Administra Juro venas al la Apelacia Administra Tribunalo.

Apelacio de verdikto de la Apelacia administra tribunalo estos traktata de la plej Alta Administra Kortumo.

Dum la Libro-Foiro oni havas eblecon diskonigi Esperanton

Jen Birgitta Anevik, sidanta en nia stando. Mallonge post la Foiro ŝi estis petita veni al BLLF en Lidköping por laŭtlegi esperantan poemon. Devus esti io pri paco.

Ŝi elektis...

Sylla Chaves (1929 – 2009) el Brazilo

Estu paco

Mi petegas al vi,
mastroj de l'tuta homaro,
ke en tero kaj maro
estu paco!
Kaj ne plu estu hezito!
Ne plu estu milito!
Estu paco tra l'tuta
tersurfaco!

La homoj fariĝos fratoj,
kaj la soldatoj,
por monda bon',
forĵetante la fusilojn,
fariĝos plugiloj
el la kanon'.

Otto Maŝl (1898 – 1973) el Vieno kaj Parizo

Espero

Dolĉa revo de l'homaro
Kie, diru, estas vi?
Ĉu en blua ond' de l'maro
Aŭ en hela sunradi'?



Ĉu vin trovas ni sur montoj,
Ĉu en spiro de l'aer'?
Aŭ en klarkristalaj fontoj
Fluetantaj el la ter'?

Dolĉa rev' pri pac' en mondo,
Revo pri eterna am',
Pri popola frata rondo,
Vin forpelis sanga dram'!

Ni ne trovas vin sur tero,
Nek en mar' nek en aer'.
Kaj nur lumas pacespero
Kiel stel' tra hommizer'.

*Dankon Birgitta pro tre delikataj, ritmaj
poemoj! /Siv*

Monica Zak, verkistino de "La knabo, kiu vivis kun strutoj", vizitis nian standon



Sur la bildo ankaŭ troviĝas Andreas kaj Inga.

La libro estas tradukita de la sveda en multajn lingvojn, i.a. en Esperanton (fare de Carl-Olof Selenius).

Monica Zak ĝojas aŭdinte ke ni uzis ŝian libron je laŭtlegado en la plurlingva biblioteko.

La libro meritas fariĝi sonlibro!!! Ni esploras ĉu eblus fari tion. Lasse Granat pretas preni sur sin la legadon de 216 paĝoj!! Ĉu la gotenburga klubo sukcesus trovi la monon?

Ni ne scias. /Siv

Svensktalande ungerska besökte vår esperantomonter

på Bokmässan. (Resumo en esperanto je la fino.)

Ágnes Morandini Harrach vet mer om svensken Valdemar Langlet än vad de flesta svenskar vet. Hon var lärare på en grundskola i Budapest, uppkallad efter Valdemar Langlet och ledde ett samarbetsprojekt med den svenska skolan i Valla, nära Lerbo, där paret Valdemar och Nina Langlet bodde efter hemkomsten från Ungern. Under 11 år hade skolorna utbytesresor för elever och lärare. Nu undervisar Agnes bl.a. en entusiastisk grupp på det svenska Deák-téri-gymnasiet i Budapest.

Ágnes kommer gärna till Sverige och föreläser om Valdemar Langlet och hans avtryck i Ungern.

Kanske esperantoklubbarna kunde samarbeta om en föredragsturné?

Plockar från nätet, eftersom mitt foto av Ágnes tråkigt nog försvann.

Ännu en gång önskar jag att Valdemar Langlet, tillsammans med sin hustru Nina, kunde få ett minnesmonument bredvid Raoul Wallenbergs fina monument i parken nära Handelshögskolan i Göteborg. Vad har Valdemar för anknytning till esperanto? Jo, som gymnasist startade han den första esperantoföreningen i Sverige, i Uppsala 1891. Mellan 1895 och 1900 var han redaktör för den första – och då enda – esperantotidskriften i världen. /Siv



Budapest hedersmedlem Ágnes Morandini Harrach mottar Nordstjärneorden (mer info i texten nedan).

*Gata i Budapest uppkallad efter Valdemar Langlet.
Foton: Riksföreningen Sverigekontakt.*

2015 höll Ágnes Morandini Harrach föredrag i Sverige om Valdemar Langlet:

RÖDA KORSET inbjöd till föredrag i skolan på Gullholmen lördagen den 2 maj 2015 klockan 16.00.

Valdemar Langlet

En bortglömd hjälte.

Mindre känd information om Svenska rödakorsets hjälpaktion under andra världskrigets slutskede i Budapest.

Vem tänker man på när man hör om en svensk räddningsaktion i Budapest vintern 1944–45. Nästan alla tänker på Raoul Wallenberg, men få tänker på redaktören och lektorn Valdemar Langlet, som tillsammans med sin fru Nina och väldigt många ungerska medarbetare genomförde en heroisk räddningsaktion i krigets fasanfulla slutskede.

Hur kommer det sig att deras namn och verksamhet inte är mer kända? Och hur hamnade de i Ungern? Varför utsatte de sig för alla dessa faror för att rädda förföljda i ett annat land? Varifrån kom all denna energi?

Svenskläraren och tolken Agnes Morandini-Harrach berättar för oss om en ovanlig person och ett märkligt öde. Vi möter en

mångsidig man som under hela sitt liv hade många järn i elden. Så småningom mötte han en kvinna som stödde honom i allt han gjorde. Även i svåra nödsituationer.

Under ett föredrag med bildvisning, bl.a. unika bilder och dokument från parets privata fotoalbum får vi berättat om Valdemar och Nina Langlet och deras humanitära gärning under andra världskriget och hedra deras insats.

Om Agnes Harrach:

Agnes Harrach är ungrare som lärde sig svenska under studietiden, studerade bl.a. nordistik och har jobbat som tolk, svensklärare och översättare under många år och brinner för Sverige och svensk kultur. Hon har skrivit flera läroböcker i svenska, översatt ett tjugotal svenska böcker (barnböcker, skönlitteratur, dokumentärlitteratur).

Agnes har varit med och bildat Ungersk-Svenska Föreningen i Ungern 1991; sprider svensk kultur i Ungern och ungersk kultur bland svenskar i Budapest; är hedersmedlem i Swea-Budapest. För alla sina kulturella insatser samt för bevarandet av minnet av paret Langlet utnämndes hon av Kung Carl

XVI Gustaf till ledamot av Nordstjärneorden 2003.

Iomete pri la sama temo, sed en esperanto:

Al nia stando en la Libro-Foiro venis svedparolanta hungarino – Ágnes Moradini Harrach. Ŝi tradukis pli ol 20 svedajn librojn, ĉefe infanlibrojn, en la hungaran. Ŝi instruis la svedan en lernejo – kaj ankoraŭ laboras por disvastigi svedan kulturon kaj svedan lingvon en Hungario kaj hungaran kulturon en Svedio.

Pri la svedo Valdemar Langlet, ŝi konas pli ol la plimulto da svedoj. Langlet vere estas forgesita heroo, kiu en Budapesto savis multajn judojn, romaojn kaj aliaj homojn, kiuj estis persekutataj de la naziistoj. Lia ruzdevena edzino, Nina, ĉiam kunlaboris kun li. La paro vivis en Hungario dum 14 jaroj kaj havis multajn geamikojn, kiuj helpis ilin kaŝi judojn kaj aliajn de la minacoj de la naziistoj. Valdemar havis postenon en la sveda Ruĝa Kruco. Pli kaj pli terura fariĝis la situacio. Valdemar skribis al la sveda registaro petante helpon. Raoul Wallenberg estis sendita. Dum ĉirkaŭ duona jaro Raoul faris multon por savi

judojn ĝis li en la fino de la milito estis kaptita de la rusoj – kaj poste malaperis en Rusio.

Valdemar Langlet havis koneksojn kun esperanto. Estis li, kiu fondis la unuan svedan esperanto-asocion, en Upsalo 1891. Dum kvin jaroj li redaktis la solan esperanto-gazeton en la mondo.

